

Juna Esperantisto

Monata Gazeto Beletristika
por Junuloj, Instruistoj kaj Esperanto-Lernantoj

Jara abono : 2 fr. 50.

33, rue Lacépède — PARIS — rue Lacépède, 33

PORTRETO DE MOSEO

(Legendo, el la Talmudo.)

De V. Doroŝeviĉ.

Kiam Moseo estis elkondukinta la Hebreojn el Egipto, la gloro pri li disvastiĝis tra la tuta tero, kiel oleo disfluas sur akvo.

Ĉiuj miris lian heroaĵon kaj parolis :

— Evidente, tiu estas sankta homo kaj plaĉa al Dio, se li povas fari tiajn miraklojn !

Venis la famo pri Moseo ankaŭ al unu araba reĝo.

La reĝo mirigite aŭskultis pri ĉio, kion faris Moseo, kaj fine sekrete invitis al si sian plej bonan pentriston kaj diris al li :

— Mi volus vidi la vizaĝon de la Dia homo. Prenu tabulon faritan el eburo, la plej bonajn el viaj koloriloj, iru al la dezerto, kie nun troviĝas Moseo, kaj, per helpo de via talento, plej zorge faru lian figuron kaj alportu ĝin al mi. Sed ĉio ĉi restu kiel sekreto nur inter mi kaj vi. Iru.

La reĝa pentristo prenis la eburtabulon, elektis la plej bonajn el la koloriloj, kaj sekrete forlasis la palacon.

Li ekiris al la dezerto, elserĉis tie Moseon, plej zorge pentris lian figuron kaj alportis ĝin al sia reĝo.

La reĝo enpensiginte longe rigardis la trajtojn de la Dia homo.

Poste li ordonis meti la bildon en sian palacon kaj invitis siajn saĝulojn.

La saĝuloj estis spertaj pri multaj sekretaj sciencoj, kaj la reĝo ofte konsiliĝis kun ili pri aferoj de sia popolo.

La reĝo montris al la saĝuloj la bildon faritan de la pentristo kaj diris :

— Vi legas kaŝitaĵojn, kiel disvolvitaĵajn rulaĵojn ⁽¹⁾. Diru do al mi laŭ la trajtoj de ĉi tiu vizaĝo, kia estas ĉi tiu homo, kaj en kio konsistas lia povo ?

La saĝuloj staris antaŭ la portreto, movante jen unu, jen la alian piedon, kaj rigardis la ĉefan el la saĝuloj.

Neniu volis unua diri sian opinion, prudente timante erari, kaj pro tio esti malhonorigita.

La ĉefa saĝulo pinĉis sian barbon, staris, rigardis, kaj fine diris :

— Li estas malbona homo.

Tiam ankaŭ la ceteraj saĝuloj malligis siajn langojn ⁽²⁾ kaj komencis kvazaŭ vete insulti la homon figuritan de la pentristo.

— Li estas homo fera, — diris unu.

— Li estas kolera kaj ekscitiĝema, — aldonis la alia.

— Li estas glorama.

— Profitama.

— Voluptama. . . .

Kaj ili trovis en li ĉiujn malbonajn kvalitojn, kiuj humiligas la homon.

Kaj ĉiuj akorde konfirmis :

— Ĉi tiu homo estas malbonagulo. Tia homo ne povas plaĉi al Dio.

— Haltu ! — ekkriis la reĝo ekscitite pro la kolero, — ĉu vi mokas min ? Ĉu vi scias, kies figuro estas ĉi tio ? De Moseo, kiun miras ĉiuj homoj. Kaj vi parolas, ke li ne povas plaĉi al Dio ! Ĉiuj homoj admiras liajn bonfarojn, sed vi trovas en li ĉiujn mankojn. Mi vidas nun vian saĝecon !

Kaj la reĝo disŝiris sur si la vestojn je signo de malĝojo.

— Ve al mi ! Ve, ke mi obeadis vin koncerne aferojn de mia popolo !

La saĝuloj pro timo falis sur la genuojn, kaj la ĉefa el ili diris :

— Nia scienco estas vera. Ankaŭ tio, kion ni parolas, estas vero. La pentristo estas kulpa. Li ne vere desegnis

(1) T. e. : vi tiel bone parolas pri kaŝitaj (sekretaj) aferoj, kvazaŭ vi legas disvolvitaĵajn pergameno- aŭ papirus-rulaĵojn skribitajn pri ili.

(2) Komencis paroli post longedaŭra silento.

la trajtojn de la granda homo kaj per tio erarigis nin. Ordonu ekzekuti lin!

Kaj komenciĝis tiam disputo. La pentristo parolis:

— Mi desegnis vere, la saĝuloj eraras.

La saĝuloj asertis:

— La pentristo malbone plenumis sian taskon!

La reĝo volis nepre sciigi, en kies flanko estas la vero, li ordonis prepari veturilon, prenis kun si la portreton kaj mem ekveturis al la dezerto.

Gvidistoj montris al li la tendaron de l'Izraelidoj, kaj li venis tien per sia ĉaro.

Tie li jam de malproksime ekvidis homon, kiu, kiel du gutoj de akvo similas inter si, similis al la figuro farita de la pentristo.

— Kiu estas ĉi tiu homo? — demandis la reĝo.

— La Dia homo, Moseo, — oni respondis al li.

La reĝo prenis la portreton kaj komencis kompari ĝin al la vizaĝo de Moseo. La portreto estis miraklo de l'arto, kaj Moseo en ĝi estis kvazaŭ viva (1).

Tiam la mirigita kaj konsternita reĝo diris, ke li deziras interparoli kun Moseo, eniris en la tendon de la Dia homo, sin klinis antaŭ li ĝis la zono, rakontis la disputon inter la saĝuloj kaj la pentristo, kaj diris:

— Pardonu min, Dia homo! Ĝis mi ne vidis vian vizaĝon, mi opiniis, ke la pentristo estas kulpa, ke li faris la figuron ne vere; ĉar miaj saĝuloj estas la plej saĝaj el tiuj de la mondo kaj scias siajn sciencojn perfekte. Sed nun, kiam mi vidas, ke la figuro estas vera, mi scias taksilian saĝecon. Mi vidas, ke ili trompis min kaj ĝenerale nenion komprenas koncerne la sciencojn. Sed ili ja manĝis mian panon (2) kaj konstante malsaĝigis min per siaj malprudentaĵoj.

Moseo responde ridetis kaj diris:

— Ne. La pentristo kaj viaj saĝuloj estas plej mirindaj spertuloj pri sia afero. Sed nur sciu: se mi estus laŭ mia naturo mem tia, kia min konas la homoj laŭ miaj agoj, mi ne estus pli bona, ol sekiĝinta trabo, kiu ankaŭ ja ne havas iajn homajn mankojn. Tiam mi havus neniajn me-

(1) Esprimo, kiu signifas plej perfektan similecon, — identecon.

(2) T. e. : laboris ne senpage.

ritojn, nek rilate al Dio, nek rilate al homoj. Jes, mia amiko, mi ne ĝenas min diri al vi, ke ĉiuj mankoj, kiujn trovis en mi viaj saĝuloj, efektive, estas kunnaskitaj kun mi, propraj al mia naturo. Eble ili estas pli multaj, ol devenis viaj saĝuloj. Sed mi mem venkis en mi la malbonajn pasiojn. Kiel oni kreskigas el kerno grandan arbon, tiel mi kreskigis en mi la bonon. Mi alkutimigis min al la bono, ĝis tiu kutimo fariĝis mia dua naturo. Jen, pro kio mi estas amata kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero.

Kaj kun bona rideto Moseo pace delasis la araban reĝon.

El la rusa lingvo tradukis MAKSIM BULOĈKIN.

AŬTUNO

*Ho, nun alvenis griĝa aŭtuno,
Ne brilas ĉarme saniga suno ...
Nuda kaj griĝa estas kamparo;
Jen, jen forflugas cikoniario!*

*En mia bela, rava ĝardeno,
Kiun mi zorgis per amopleno,
Velkas la floroj ... kia doloro!
Ho, kiel batas mia la koro!*

*Kiam floraro al mi ridetis,
Mia ĉagreno ien faletis ...
En koro mia regis la ĝojo,
Kaj dolĉe paŝis mi sur vivojo.*

*Nun ĉiutage, eĉ ĉiuhore,
Unu post unu velkas floreto,
Kiu ĉarmigis min bonodore,
Kaj kune kun ĝi mia rideto ...*

*Mi forpeladis ĉiam dezirojn
Por ne deŝiri ĝin por bukedo,
Kaj kompateme kasis sopiron ...
Kaj nun ekvelkis la tuta bedo.*

*Ĉielo nuba, pluva, sensuna
Malgajajn pensojn al mi alportas,
Kaj la siblanta vento aŭtuna
Pri la velkado ĉiel raportas.*

*Ho, malfeliĉo kaj la teruro!
Griĝa aŭtuno, kiu alvenis,
Ĉiujn belajojn de la naturo
Kaj ĉiujn florojn miajn forprenis.*

*Ne malesperu, milda knabino,
Ne estos vana via laboro,
Ĉar tia estas flora destino ...
Jen, nun trapasis ĝia valoro.*

*Per via zorgo de l' flor'deŝiro
Vi flegis semojn de l' certa morto;
Ho, kia estos via admiro,
Se vidos ilin en bona sorto.*

*Ho, estu nuda tuta kamparo,
Manku floraro en la ĝardeno ...
Rigardu, kia grandega aro
Da nutraj fruktoj, da bona greno.*

*Per kompatema la via faro,
Per via amo, zorgo sufiĉa,
Ekfloros ree via floraro
Kaj minutetoj de l' viv' feliĉa!*

LA MALGRANDAJ BRUNAJ HOMOJ

Ferakonto, adaptita de FRANK MUNDELL. (1)

I. — La averto de la sorĉistino de la Akvo.

La malnova muelejo staris en valo inter du altaj montoj. Tiel forta estis la rivereto, kiu rondirigis la grandan radon, ke ĝia fluado neniam ĉesis de jarfino ĝis jarfino. Eĉ en la plej varmega vetero, kiam aliaj najbaraj mueliloj estis devigataj halti pro manko da akvo, aŭ en la profundo de la vintro, kiam aliaj muelejaj riveretoj englaciĝis, tiu rivero ankoraŭ fluadis, kaj la muelilo ankoraŭ funkciadis de la tagiĝo ĝis la mallumo, tagon post tago, jaron post jaro.

Kun la tempo la muelisto maljuniĝis. Enuigis lin la muelilo kaj ĝia senĉesa bruo. Li jam amasigis monon, kaj li decidis pasigi la ceteron de siaj tagoj en la urbo.

Ne malfacile estis trovi aĉetonton, sekve la muelejo transiĝis en aliajn manojn. Kiam la maljuna muelisto transdonis la muelojn al la nova posedanto, li diris :

— Ĉar ni nun finis nian aferon, permesu, ke mi donu al vi unu vorton de konsilo. Eble iufoje vizitos vin strangaj malgrandaj homoj, kiuj petos de vi favorojn. Faru kion ajn ili petos, eĉ kvankam tiel farante vi opinios, ke vi faras al vi malprofiton. Estos por via profito, se vi estos amika al ili.

La nova muelisto tiam transloĝiĝis en la muelejon. Li havis edzinon kaj filon nomitan Anĉjo. La muelisto estis laborema kaj ŝparema homo, kaj li baldaŭ ŝparis monon el la malnova muelejo.

Kelkaj monatoj forpasis, kaj neniam, eĉ unu fojon, li vidis aŭ priaŭdis la malgrandajn homojn, pri kiuj la maljuna muelisto informis lin. Sed unu matenon, kiam li staris apud la pordo de la muelejo, subite aperis antaŭ li malgranda sinjorino, ĉirkaŭ du futojn alta.

— Bonan matenon, najbaro, — ŝi diris per neforta klara voĉo. — Mi venas peti vin, malfermu viajn kluzojn je tagmezo, por ke via muelilo haltu duonhoron. Ni faris grandan lesivadon, kaj ni estas malplenigontaj niajn kuvojn. La ekstra akvo povus kaŭzi superakvegon, kiu eble difektus vian muelilon. Adiaŭ; ne forgesu la amikan averton.

La malgranda estajo kapkline salutis kaj malaperis tiel subite, kiel ŝi venis.

La muelisto tre laborigis sian cerbon. Li neniam antaŭe aŭdis paroli pri tiaj najbaroj.

(1) La angla eldono de ĉi tiu fabelo estas publikigita de Stead's Publishing House (Londono), kiel N-ro 160 de « Books for the Bairns » (Libroj por la Infanoj).

Antaŭ nur malmultaj tagoj, li iris al la plej supra parto de la valo por haki hejtolignon, sed li vidis neniujn loĝejojn en la kvietaj malhela arbarego. « Ĉiaokaze, — li ekkriis, — kiuj ajn ili estas, kaj eĉ se ili faris neniam tiel grandan lesivadon, mi ne volas haltigi mian muelilon. Estas tiom da faruno por mueli hodiaŭ, ke ni devas ne perdi la tempon. »

Li do iris labori, kaj forgesis la averton.

Kiam li sidis ĉe sia tagmanĝo, unu el siaj laboristoj enkuris.

— Mastro, mastro, — tiu kriis, — ĉu la malgranda virineto de la akvo ne sciigis vin, kiel ŝi ĉiam faradis al mia antaŭa mastro? Ŝi kaj ŝia popolo faris grandan lesivadon kaj malplenis siajn lavkuvajn. Aŭskultu! kiel la rivereto bruas kaj furiozas, kaj la rado rondiras kvazaŭ irigata de uragano! La ĉielo estas ja hela, neniom da pluvo falis, tamen — rigardu la kuregantan torenton.

La muelisto alarmita elrigardis tra la fenestro. Lia vizaĝo ruĝiĝis de kolero, kaj li murmuris: Kio estas por mi la sorĉistino kaj ŝia lesiva tago?

Post unu du horoj la rivereto ree fariĝis kvietaj; sed la rado kaj aparato de la muelilo estis difektita. Kostis multe da tempo kaj laboro, kaj ankaŭ da mono, por rebonigi ĉion.

Dum oni riparas la muelilon, la muelisto iufoje demandis al si, ĉu la malgranda sinjorino iel kaŭzis la malfeliĉaĵon, sed li forigis la penson el sia kapo kiel ridindan sensencaĵon.

II. — La malfeliĉaĵo de la muelisto.

Unu tagon la muelisto staris rigardante sian fojnkampon. — La herbo aspektas tre bone, — li pensis, — kaj la vetero estas bela. Morgaŭ oni devas falĉi la herbon. Subite, el la longfoso ĉe la fino de la kampo, leviĝis du grandaj aerglobetoj, kiuj flugis en lia direkto. Kiam ili venis pli proksime, ili krevis, kaj du malpezaj figuroj aperis. Ili estis tiel delikataj, ke la muelisto imagis, ke li povas tra ili vidi la herbon. dum ili traflugis super la fojnkampo. Ili venis ĝisproksimeco de malmulte da futoj de kie li staris, kaj tiam diris mallaŭta voĉo:

— Bonan tagon, muelisto; ni venas peti vin pri favoro. Ni petas, ke vi permesu al ni danci en via fojnkampo hodiaŭ vespere.

— Kio? — kriis la muelisto per malafabla voĉo, — danci sur mia fojnkampo kaj piedpremi la herbon?

— Ni ne faros ian malutilon al via herbo, — respondis la voĉo, — ni kaj niaj amikoj dancadas tiel malpeze, ke ni apenaŭ fleksos la pintojn de la plej longaj folioj de la herbo.

— Kial do peti min? respondis la muelisto. — Se vi faros nenian malutilon, estos indiferentè por mi, ĉu vi dancados la tutan jaron.

— Dankon, — diris la malgranda feino. — Unu aferon plu ni petas por via propra profito. Ne falĉu la herbon ĝis falos pluveto post nia dancado. Tio estas plej grava; ne forgesu.

La malgranda feino malaperis.

— Sensencaĵo! — diris la muelisto. — Ĉu oni iam aŭskultis tian malsaĝajon? Ĉu mi devas prokrasti la fojnofaradon ĝis pluvos? Eble ne venos tia seka vetero la tutan someron. Morgaŭ mi sendos miajn laboristojn ĝin falĉi.

Li iris returne al la muelejo, kaj ordonis falĉi la herbejon la morgaŭan tagon, sed li ne diris al iu ajn unu vorton pri tio, kion li aŭdis.

En la nokto, kiam Anĉjo, la filo de la muelisto estis kuŝiĝonta, li elrigardis tra la fenestro. Miregis lin tio, kion li vidis.

— Ho, patro! — li ekkriis, — estas en la herbejo iu kun lanterno. Kiel rapide li kuras! Kiel malproksime li povas alsalti! Jen ankoraŭ unu! Venu, patro, venu vidi, en kia granda nombro ili estas!

La muelisto kaj lia edzino iris al la fenestro, kaj vidis, ke la herbejo estas plena de ŝajne dancantaj lumetoj. Jen ili sin aranĝis laŭ granda rondo, jen ili duope kaj triope diskuris, jen ili kuniĝis kaj denove disiĝis por danci kvazaŭ frenezuloj.

— Ili estas vaglumoj, Joĉjo-kun-lanternoj, kiel oni nomadas ilin, — diris la muelistedzino. — Ili venadas el la malseketa tero, kaj la vento ilin dispeladas.

Baldaŭ la familio de la muelisto kuŝiĝis.

La morgaŭan tagon, laŭ la ordono de la mastro, liaj laboristoj falĉis la herbon. Ĉar la vetero estis tiel bela, ili faris la fojnon en la daŭro de malmultaj tagoj, kaj enmetis ĝin en la fojnejon. Ne tuŝis ĝin eĉ unu guto da pluvo. Tamen tuj kiam la brutoj manĝis iom da ĝi, ili ekmalsaniĝis kaj komencis morti unu post alia. Post kelke da semajnoj la brutejo estis malplena. Eĉ malsaniĝis kaj mortis la ŝafoj kaj porkoj, kiujn oni paŝtis en la herbejo post la fojna rikoltado. La muelisto aĉetis brutojn, kaj nutris ilin per la sama fojno, kaj tiuj ankaŭ mortis. Li forte ekscitiĝis, kaj ja ŝajnis, ke li frenezigiĝos. Li imagis, ke iu venenis la brutojn, kaj li minacis foreksigi ĉiun laboriston de la muelejo.

En sia malĝojo li decidis iri al la urbo por peti konsilon de la maljuna muelisto. Kiam tiu bona maljunulo aŭdis pri ĉio, kio okazis, li diris: « Devas esti, ke vi forgesis la averton, kiun mi donis al vi. Ĉu vi forgesis, ke mi diris, ke vi devas neniam ofendi viajn strangajn najbarojn? Mi timas, ke vi ja forgesis. Mi bedaŭras, mia amiko, ke mi ne povas alimaniere helpi vin,

ol doni al vi bonan konsilon. Bruligu la fojnon antaŭ ol ĝi faros pli da malutilo, kaj de nun ne permesu, ke via malbonhumoro ekregu vin. »

La muelisto iris hejmen kaj bruligis la fojnon. Per la helpo de siaj amikoj li ankoraŭ unu fojon aĉetis brutojn, kaj ili ĉiuj restis sanaj; sed li tute ne estis feliĉa. Lia perdo estis granda kaj li faris ŝuldojn.

Li pli forte laboradis ol iam antaŭe, leviĝadis frue kaj malfrue kuŝiĝadis. Li ordonis al sia edzino, ke ŝi ŝparu kiel eble en la kuirejo, kaj neniam uzu du aĵojn, se estos eble fari per unu. Li jam ne kondukadis bone al siaj laboristoj: li donadis al ili malbonan nutron kaj nesufiĉon da ĝi. Ĉiu grumbladis, plendadis, sed li ne atentis tion. Neniam li almozdonis eĉ unu spesdekon al iu malfeliĉulo, kiu frapis ĉe lia pordo.

III. — Ĉio perdiĝas.

Tagon post tago aferoj fariĝis pli kaj pli malbonaj. Unu tagon frapis ĉe la pordo de la muelisto tre tre malgranda viro. Li estis vestita en brunaj vestoj de la kapo ĝis la kalkanoj, kaj lia vizaĝo estis preskaŭ tiel bruna, kiel liaj vestoj. Li etendis saketon kaj petis iom da griaĵo. La muelisto kolere rigardis lin kaj diris: « Forigu vin tuj ».

— Donu nur malmulton, — petegis la vireto. — Jen mia saketo estas tre malgranda; ĝi ne povas enteni pli ol unu plenanon.

— Mi ja' ne volas doni al vi eĉ unu eron, — diris la muelisto per laŭta voĉo.

— Kompatu min, — diris la malgranda bruna viro. — Mi devas ricevi iom da griaĵo, kaj mi devas ricevi ĝin kiel donacon, se alie mi volonte pagus al vi ĝian pezon da oro.

— Tre bela parolo, — respondis la muelisto fermante la pordon per puŝejo, kiu skuis la domon.

Okazis ke Anĉjo, la filo de la muelisto aŭdis ĉion. Li sentis malĝojon pro la kompatinda viro, kaj decidis helpi lin, se li povas.

Li eliris el la domo per la posta pordo kaj kuratingis lin. « Haltu unu minuton, — li diris, — donu al mi la saketon, kaj atendu ĉi tie silenta ĝis mi revenos. »

La vireto donis la saketon, kaj Anĉjo kuris rapidege al la provizejo, kie troviĝis multaj sakoj da griaĵo. El unu el tiuj li plenigis la saketon per la plej bona griaĵo el la muelejo. Tiam li kuris returnen kaj donacis ĝin al la malgranda bruna viro, kiu prenis ĝin kun ĝojo kaj varme dankis la knabon pro lia bonkor-eco. « Se iam vi vin trovos en granda malĝojo, — diris li, — kaj

bezonas helpon, venu al la fonto apud la kverko. » Anĉjo rigardis la malgrandan brunan viron, dum tiu rapidis supren sur la kruta vojo al la monto. Li kuris rapidege, kaj baldaŭ malaperis en la malluma arbarego.

— Kompatinda vireto, — pensis Anĉjo, — kiel li rapidas ! Verŝajne li loĝas sur la monto, kie, kompreneble, li ne povas ricevi griaĵon, kaj pro tio venis ĉi tien por ĝi. Eble li havas hejme malsatan malgrandan infanon, kiu ploras por griaĵa ŝupo. Mi estis malbona, ke mi nepermesite prenis la griaĵon el la provizejo de la patro, sed la malgranda viro ŝajnis en tiela malĝojo, ke estus kruele forsendi lin malplenmane. Mi parolos pri ĝi al la patrino, kaj petos, ke ŝi donu al mi malpli da griaĵa supo por la matenmanĝo kaj vespermanĝo, ĝis tio repagos la prenitajn griaĵon.

Li iris al la patrino kaj konfesis al ŝi, kion li faris, kaj ŝi pardonis lin, ĉar li diris la veron kaj volis kompensi pro sia faro.

La muelisto ne ankoraŭ atingis la finon de siaj malfeliĉaĵoj. Apud la fino de la somero, ventego kaj pluvego balais la valon. Poste okazis tiel terura superakvego, ke la muelisto kaj lia familio apenaŭ havis tempon savi al si la vivon, lasante sian tutan havon al la furiozo de la torento. Kiam la superakvego estis plej granda, ekfulmo frapis la muelejon kaj ĝin ekbruligis. De la monteto, kien la familio rifuĝis, la kompatinda muelisto rigardis la detruadon de ĉio, kion li havis en la mondo, kaj kiam venis la vespero, nur restis amaso da nigraj ruinoj.

La sekvintan tagon li starigis krudan ŝirmilon en la sola ankoraŭ staranta angulo de la muelejo. Tie la familio loĝadis en la plej granda malriĉeco kaj mizero.

El ĉiuj brutoj de la muelisto, nur du kaproj saviĝis. Tiujn Anĉjo prizorgadis, kaj ĉiutage forkondukis por paŝti sur la montoj. Unu matenon, kiam li ekiris, la kaproj elektis la saman vojeton, sur kiu la malgranda bruna homo iris, post kiam li ricevis la saketon da griaĵo ĉe la muelejo. Demandante sin pro kio ili tiel faris, Anĉjo ilin sekvis, kaj ili kondukis lin pli malproksimen ol li iam antaŭe iris.

Fine li venis al granda kverko, kiu kreskis apud kaverno. Tie la kaproj ekpaŝtis sin, kaj Anĉjo sidigis sub granda arbo por ripozi, ĉar la longa irado lin lacigis. Li ne povis ne pensadi pri la multaj malfeliĉaĵoj, kiuj okazis lastatempe. « Ho ! — diris li, — se la patro estus pli gaja kaj la patrino malpli malĝoja, baldaŭ refariĝus komforte al ni, kaj eĉ sen la muelejo, kaj nutrante nin nur per seka pano kaj kapra lakto, mi estus tute kontenta. Kiam mi estos pli granda, mi forte laboros kaj ŝparos tiom da mono, kiom mi povos, por rekonstrui la muelejon. »

IV. — Anĉjo trovas amikon.

Tiel pensante, Anĉjo endormiĝis. Post iom da tempo li aŭdis voĉon vokantan: « Anĉjo! Anĉjo! » Li malfermis la okulojn, por vidi, kiu vokas lin. Li rigardis ĉirkaŭen, sed li vidis neniun. Tiam li ekrigardis duontime en la kavernon. Tie li vidis sian konaton, la malgrandan brunan viron.

— Fine vi ja venas Anĉjo, mia knabo, — diris li kun afabla kapklino. — Vi devus esti veninta antaŭ longa tempo, ĉar mi kaj miaj amikoj atendadis vin. Mi ne povas eliri hodiaŭ, tial vi devas enveni. Envenu sen timo, kaj mi montros al vi mian domon kaj ĝardenon; ili nepre plaĉos al vi.

Anĉjo postiris la malgrandan brunan viron, kiu kondukis lin laŭ granda ŝtona trairejo. Komence estis tre mallume; sed la lumo iom post iom fariĝis pli hela. Irante laŭ mallarĝa koridoro, kies muroj estis el feraj platoj kune ŝraŭbitaj, ili atingis alian koridoron kovritan per kupraj platoj. Tio kondukis al granda vestiblo, kies kolonoj kaj plafono estis el polurita arĝento.

El tiu vestiblo ili pasis tra paro da duopaj pordoj en grandiozan salonegon, kies muroj, plafono kaj planko estis el solida oro, kaj la fenestroj el bele gravurita kristalo. Nun ili eniris ĉambron flamantan per ruĝaj rubenoj, dum la fenestroj brilegis per la ĉielarkaj koloroj de belegaj diamantoj.

La malgranda viro kondukis Anĉjon tra kelkaj aliaj ĉambroj, ĉiu konstruita el diversspecaj altvaloraj ŝtonoj kaj rebriliganta radiojn de verda, blua kaj purpura lumo, per smeraldoj, safiroj kaj ametistoj.

— Miaj fratetoj ĝojos vidi vin, — fine diris la malgranda bruna viro. — Venu en la ĝardenon.

El la angla lingvo tradukis GEGO

(tradukinto de « Kara Panjo »).

(Fino en la venonta numero.)

EDZIĜO ESPERANTISTA. — Nia Fundamento-fidela samideano kaj amiko S-ro **Edmond Privat**, la fervora, agema kaj talenta propagandisto, unu el la fondintoj de nia gazeto, kiu jam per multaj tre gravaj verkoj riĉigis nian literaturon, edziĝis kun la ĉarma Esperantistino F-ino **Angèle Fallot**, la 25-an de Oktobro 1911, en Besançon (Francujo).

Nian plej koran gratulon ni sendas al la junaj geedzoj kaj deziras al ili plenan feliĉon.

FELIETONO

Pensoj de saĝuloj.

— Homo povas plenumi ĉion, kion li volas, se li okupiĝos pri tio, kio estas laŭforta. — (*Safir.*)

— Pri memmortigantoj plori ne valoras; kiu ankoraŭ estas taŭga por vivo, tiu ne mortas, kaj al kiu ankaŭ vivo estas taŭga, tiu ĝin ne pereigos.

— Ekzistas nur unu rimedo por plibonigi la vivon: la homoj mem devas plibonigi. — (*L. Tolstoj.*)

— Neniu devas tro malmulte taksi siajn fortojn, neniu devas pensi, ke sen li afero fariĝas. En la batalo por la progreso de la homaro estas necesa ĉiu forto, kiel ajn malgranda ĝi estas. — (*A. Bebel.*)

— Kiu ĝis la tombo portas idealojn de sia juneco, tiu dum la tuta vivo restas juna. — (*Molkenbur.*)

— Ĉio, kio baras spiritan kreskon de homo, kio detenas ekfloron de nova vivo en li — estu ĝi eĉ lia propra mano, — devas esti forigita. Estu ĝi have aŭ afero, okupiĝoj.... — (*Fru Maria Sik.*)

— Ĉiu homo havas en la mondo tiun signifon, kiun li mem al si doni scias.

— La granda amo estas sendisiĝa de la profunda saĝo; larĝeco de la saĝo egalas profundecon de la koro, tial ekstremajn suprojn de la humaneco atingas la grandaj koroj, ili do estas grandaj saĝoj.

— Filozofo estas nur tiu, kiu malsuprenigis ĝis sia nivelo plej altan, kaj kiu ĝis la sama nivelo suprenigis plej malaltan, tiu, kiu sentas sin egala kaj frato de ĉio vivanta. — (*Karlejl.*)

— « Laboru aŭ mortu » — jen la devizo de la Naturo. Se do vi forlasas laboron, vi mortos intelekte, morale kaj fizike.

— La vivo estas tia, kia vi ĝin faras.

— La mondo estas spegulo, en kiu ĉiu vidas sian propran reŝpeguliĝon. Sulkigu la vizaĝon antaŭ ĝi: ĝi montros al vi malgajan fivizaĝon; ridetu kontraŭ ĝi, ridu antaŭ ĝi: vi trovos ĝin gaja kamarado. — (*Tokkerekj.*)

— Plenumu vian devon, kaj la rezultaton lasu al la Difininto ĝin por vi. — (*L. Tolstoj.*)

La fratinoj de « Cindrulino ».

... Cindrulino do estis nun bela princino, sed ŝiaj fratinoj, pli ol antaŭe, enviis ŝin.

Vane ŝi faris al ili multegajn donacojn, vane ŝi deziris edziniĝi ilin kun potencaj sinjoroj; ilia envieco ne ĉesis.

Tial, la princino estis malfeliĉa, kaj ŝia baptopatrino, la bona feino, trovis iun tagon ŝin ploranta.

— De nun tiuj malspritulinoj ĉesos vin ĉagreni, — ŝi diris.

— Kion vi faros, baptopatrino?

— Ion; sed ni estu diskretaj.

Post momento, la plej maljuna fratino mallaŭdis belegan diamanton, kiun la princo donis al Cindrulino. Tuj ŝi sentis tikleton sur sia kapo: ratvosto estis kreskinta tie.

— Mia fratino, — diris pli malfrue la pli juna, — ĉu vi vidis la silkrobon, per kiu nia malpurulineto sin vestos dimanĉon?

Kaj tuj unu el ŝiaj haroj fariĝis ratvosto.

Post ĉiu atako de envieco: nova ratvosto! La malfeliĉulinoj tute malbeliĝis.

Cindrulino mem petis poste pardonon por ili. « Ilia malfeliĉeco, — ŝi diris al la feino, — pli malĝojigas min, ol ilia envieco. »

La feino kompatis al ili, dank' al la petoj de Cindrulino, parolante al la kulpulinoj: « Mi deprenas tiun fiornamaĵon, kiu vin ridindigas. Sed, se vi ne forpelos el viaj koroj tiujn malnoblajn sentojn de envieco, mi anstataŭos la ratvostojn per serpentvostoj. »

Ŝi etendis sian magian bastoneton al ili, kaj jen la ratvostoj fariĝis belegaj kapharoj.

Tradukis J. GIRAUDET.

BIBLIOGRAFIO

La eldonantoj, kiuj deziras, ke ni raportu pri iliaj eldonaĵoj, estas petataj ĉiam sendi donace al la Redakcio po du ekzempleroj de ĉiu verko.

La Vendetta ⁽¹⁾, novelo de H. DE BALZAC, tradukis MARCEL MERCKENS. Kolekto de « Lingvo Internacia ». 120 p. 14 × 18. — Paris, Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède. Prezo: fr. 1,25 (Sm. 0,50).

Kiel en franclingvo, tiel en Esperanto la fama rakonto de H. de Balzac estas modelo de bela literaturo, dank' al tre laŭdinda traduko de nia ĵus mortinta amiko Marcel Merckens. Per sia stilo sobra, preciza, kaj samtempe simpla kaj ĉarma, la tradukinto parolas la lingvon de ĉiuj bonaj Esperantistoj, nian komunan multamatan lingvon, kiu

⁽¹⁾ Vendetta (itala vorto) estas venĝo, sed ankaŭ multe pli. Tio estas sovaĝa venĝado, nepacigebla malamego, per kiu tutaj familioj persekutas unu la alian, ofte ĝis tuta detruo. Sango alvokas sangon: tiel ordonas barbara tradicio de honoro. Tiu antikva moro precipe furiozadis iam en Korsiko. Nur post jarcenta penado la Francoj sukcesis ĝin elradikigi, kaj neplene. — (Noto de *V* tradukinto.)

estas la lingvo de la unuaj modeloj kaj, certe, tiu de la estonteco. Ĝi estas fundamenta verko, sen iu ajn el tiuj turmentitaj frazoj, sen falso-perfektigaj sanĝetoj en la gramatiko aŭ en la vortaro, kaj lasus impreson, kvazaŭ oni ne estus en sia propra hejmo, parolante kun siaj kutimaj familianoj; ĝi estas la lingvo de la Universala Vortaro, la vere faciluza, sufiĉega, bela kaj praktika Esperanta lingvo. — Sur la unuaj paĝoj troviĝas portreto de Marcel Merckens, kaj antaŭparolo de Prof. Cart, al kiu la traduko estas dediĉita. En kelkaj emociplnaj paĝoj, la maljuna profesoro de Merckens priskribas la vivon de sia ekslernanto, lian longan, preskaŭ senripozan bataladon dum dek jaroj kontraŭ la morto, lian Esperantistan penadon, lian entuziasmon kaj konfidon al la sukceso de la fundamentaj principoj de nia lingvo, fine, liajn lastajn momentojn. Ni tutkore asociiĝas al tiuj esprimoj de korento, kaj kun li, ni bedaŭras, ke la morto tiel frue frapis nian fervoran kaj multŝatatan pioniron. — La libro estas eldonita kun granda prizorgo sur tre bela papero, broŝurita en duonkartona kovrilo. La kompostistoj lasis en ĝi nenium el tiuj eraroj, kiuj malagrablamente impresas la leganton, kaj prezentis libron tute indan de tiu grava verko, kiu devas esti ĉe la plej bona loko, kiel modelo de pura fundamenta stilo, kiel juvelo de beletristiko en ĉiuj esperantistaj bibliotekoj. — (N.)

10-spesdeka Biblioteko Esperantista, eldonita de « Esperanto-Propaganda Instituto, Kaiser-Wilhelm-Str. 15, Leipzig ». — N-ro 4: *Esperanto kaj Ido* (16 p., 11 × 15,5; prezo: Sm. 0,10), estas bonega, de nia samideano L. E. MEIER farita traduko el la grava verko « La question de la langue auxiliaire internationale » de G. Gautherot. — N-ro 5: *Vidaĵoj de Senlimo* (24 p., 11 × 15,5; Sm. 0,10), originala traktato de Prof. MARCEL FINOT. Belstila, korekta kaj interesplena verko de la bone konata esp. verkisto pri la misteraĵoj de la Universo.

Per la sama Instituto estas riceveblaj: *portreto* gravuraĵa de D-ro L. L. Zamenhof, ekstera grandeco 22 × 31, prezo afrankite Sm. 0,850. Fine ni havas belan portreton artistan, kiu tute indas troviĝi en ĉiu grupejo kaj privata esperantejo. — *La plej bonaj spritaĵoj el Munhenaj Flugantaj Folioj*, kolektitaj de S-ro Josr, 64 p., 13 × 20 (eld. Walther Fiedler), prezo: Sm. 0,60. La humoraĵa gazeto « Fliegende Blätter » estas unu el la plej valoraj de tiu speco konata en tuta mondo; tial oni povas kun ĝojo saluti ĉi tiun verketon amuzan. — *Elekto el germana kantrezoro de Erk*, 48 p., 20 × 28 (eldon. C. F. Peters), prezo: 1 Sm. Enhavas 37 konatajn popolajn kantojn germanajn kun traduko farita per la zorgo de G. E. A. kaj provizita por kanto kaj fortepiano.

L'Esperanto à l'École. par J. M. PICARD. 216 + XXVIII p. 12 × 17. — Coulommiers (Francujo), P. Brodard. Prezo: fr. 2,20. — Bindita. (Aĉetebla ĉe la Presa Esp. Soc., 33, r. Lacépède, Paris.)

Jen bonega libro aperanta precize en la oportuna momento por montri al la malamikoj de nia lingvo, ke Esperanto kaj franca lingvo estas kunligataj per similaj gramatikaj reguloj kaj ke, dank' al Esperanto, la lernantoj povas *ellerni* la francan lingvon kaj ĝin pli korekte paroli poste. Tiu libro faros, se ĝi estos akceptita de la registaro franca, grandan utilon en niaj lernejoj francaj, kaj S-ro Picard, modesta kaj fervora Esperantisto, estos havinta la honoron pli forte ankoraŭ antaŭen paŝigi nian lingvon. — (D. S.)

Analitika Geometrio Absoluta, dua volumo: la spaco Bolyai'a. Verkis Prof. D-ro CYRILLO VÖRÖS. 200 p. 16 × 24. — Libr. Ludoviko Kókai, Budapest IV., Károly-utca 1. (Hungarujo). Prezo: 4 Sm.

La matematikistoj kun plezuro akceptos jenan altvaloran verkon, kaj ĉiu Esperantisto povas danki kaj saluti ĝian aŭtoron, kiu per siaj bonegaj verkoj tiel grandsignife riĉigas nian sciencan librotrezoron.

Kondukanto al belega Skotlando, 32 p. 9 × 12. — Geo. Higgie & Co, Printers & Publishers, Rothesay. Prezo: 4 Sd.

Tiu gvidlibreto faras bonan servon al vojaĝantoj en Skotlando.

Portreto, rakonto de N. V. GOGOL, el la rusa lingvo tradukis D-ro ANDREO FIŠER. 85 p. 14 × 19. — Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris. Prezo : fr. 1,25 (Sm. 0,50).

Tiun strangateman, atentallogan romanon la mondfama rusa aŭtoro verkis en 1842. D-ro Fiŝer prave agis ĝin transdonante al la librotrezoraro de Esperanto. La stilo estas bona kaj fundamenta; kelkloke la tradukinto uzas ĝis nun nekutiman vortfaradon (el fundamentaj elementoj), kiu tamen neniel malhelpas la tujan komprenon.

Tiz nap Cataloniában (Dek tagoj en Katalunujo), irta Ifj. MARICH ÁGOSTON. 48 p. 10 × 14. — Eld. « La Verda Standardo », Budapeŝt IX., ŭllői-ut 59. (Hungarujo). Prezo : 80 heleroj (32 Sd.).

En tiu ĉi hungarlingva broŝuro ilustrita, la aŭtoro lerte priskribas sian vojaĝon je la Kvina Kongreso. Bona propagandilo por Hungaroj.

PEDAGOGIA FAKO

La rekta komplemento. (Responde al S-ro G. B.) — Kvankam la demando ne rilatas speciale nur al Esperanto, ni vo'onte respondas ĝin. La rekta komplemento estas rekonebla, se oni metas la frazon en *pasivan* formon : la subjekto de la pasiva frazo estas la rekta komplemento en la aktiva frazo. Ekz. : Petro frapas *la tablon* (rekta komplemento), — *La tablo* (subjekto) estas frapata de Petro. La instruisto laŭdas *la bonajn kaj diligentajn infanojn* (r. k.), — *La bonaj kaj diligentaj infanoj* (s.) estas laŭdataj de la instruisto.

La neŝangeblaj vortoj ne ricevas la akuzativan literon *n*; ekz. : Karlo manĝis *du pomojn* (r. k.), Ludoviko *tri* (r. k.), — *Du pomoj* (s.) estas manĝitaj de Karlo, *tri* (s.) de Ludoviko. Karlo manĝis *tiom* (r. k.) da pomoj, *kiom* (r. k.) Ludoviko, — *Tiom* (s.) da pomoj estas manĝitaj de Karlo, *kiom* (s.) de Ludoviko.

Post « po » oni ne uzas akuzativon, eĉ kiam ĝi rilatas al rekta komplemento; ekz. : ... al ĉiu el la infanoj mi donis *po tri pomoj* (Ekzercaro, § 14).

HUMORAĴOJ

Zoologio. — La 7-jara Toto ricevis premion pri zoologio. — « Kio estis la temo proponita? » demandas lin lia avo. — « Oni demandis, kiom da piedoj havas la kamelo. » — « Kaj kion ci respondiŝ? » — « Mi respondiŝ, ke ĝi havas tri. » — « Kaj oni tamen konsentis al ci premion? » — « Jes; ĉar ĉiuj aliaj respondiŝ, ke ĝi havas du. »

Sendecidemo. — Mastro Stefano iris ĉasi. Por sia matenmanĝo li kunportis du krudajn ovojn, kiujn, por protekti ilin kontraŭ disrompiĝo, metis en sian tabakujon. Sed, ho ve! mastro Stefano falis kaj la ovoj disrompiĝis kaj miksiĝis kun la tabakeroj.

Stefano elprenas la tabakujon el sia poŝo, malfermas ĝin, rigardas la miksaĵon, kaj poste murmuris :

— Nun mi vere ne scias, ĉu mi fumu aŭ manĝu tiun ĉi fuŝaĵon.

Erare. — Scienculo, silentamanto, estante sola kun la infanoj en la hejmo, enlitigis ilin, por povi trankvile labori. Lia edzino jus revenas hejmen, kaj demandas lin, ĉu li multe klopodis por kuŝigi la malgrandularon. — *La scienculo* (montrante knabeton): Nur tiu ĉi ribelis, kvazaŭ diableto. — *La edzino* (rigardinte la knabeton): Sed, malfeliĉulo! li ja estas la filo de l' najbarino!

Eksperimento. — *Li*: Kial vi kuiras fiŝojn ĉiutage? ĉu vi tiel multe ŝatas ilin? — *Ŝi*: Ne; sed oni sciigis al mi bonegan rimedon por eltiri fiŝoston el la gorgo, kaj mi tre dezirus ĝin provi.

Gluita. — « Panjo, ĉu harsmira oleo estas en ĉi tiu boteleto? » « Ne; ĝi estas fluida glugumo. » — « Ha! jen kial mi ne povas demeti de mia kapo la ĉapon. »

Ne peninde. — Domo ekbrulas. Preterpasanto ĝin rimarkas. Li ankaŭ vidas, ke ĉe fenestro de la ekbrulanta domo elrigardas sinjoro. La preterpasanto kun ekscitita voĉo diras al li:

— Sinjoro, sinjoro! savu vin! via domo brulas!

— Neeble, — respondas tiu trankvile, — tiu ĉi domo ne apartenas al mi, mi estas nur loĝanto en ĝi.

Riproĉo. — Ekzekutisto estas tuj pendigonta mortkondamniton, kiu havas longan barbon. Tiu barbo malhelpas la ekzekutiston en lia tasko, li ne povas surmeti la ŝnuron sur la kolon de l'ekzekutoto. Post kelka vana penado li prenas tondilon kaj detondas la barbon de la pendigoto, dume li riproĉe atentigas lin:

— Sinjoro, vi estus devinta vin razigi. Alian fojon estu pli antaŭzorgema!

Kompetenta kritikisto. — *A*: Vidu, amiko, tie iras Baltazaro kun ĉarma Norvegino. Kaj aŭdu, ili babiladas norvege. Baltazaro vere bonege parolas la norvegan lingvon. — *B*: Ĉu vere? mi eĉ nesciis, ke vi ankaŭ konas la norvegan lingvon. — *A*: Mi ja ne konas ĝin. — *B*: Ne? kial do vi povas aserti, ke Baltazaro bonege parolas norvege? — *A*: Nu, ĉar mi rimarkis neniun eraron en lia norvega parolo.

Anarĥio. — *Bubo* (8-jara, al sia amikino 7-jara): Mia kara elektino, ni forkuru el tiu ĉi mizera regiono! Ni transmigrigu en la landon, kie nur ĉokoladoj, bombonoj kaj konfitaĵoj kreskas, kie ni estos ĉiam liberaj, kie oni nur ludas kaj amuziĝas, kie ne ekzistas lernejoj, kaj kie ni ne estos devigataj suferi la tiranecon de la gepatroj!

Ne estas grave. — Kuracisto serioze admonas sian pacienton, maljunan drinkemulon:

— Vi nepre devas ĉesigi la drinkadon. La senmezuraj alkoholaĵoj tute difektos vian korpan organizon; eĉ povas okazi, ke vi blindiĝos kaj surdiĝos.

— Ne estas grave, sinjoro doktoro. Mi estas okdekjara, mi ja vidis kaj aŭdis jam multon.

Malice. — « Nu, amiko, vi ne estis bona profeto. Mian dramon oni ne elfajfis en la teatro. » — « Kompreneble! Oni ja ne scipovas fajfi kaj oscedi samtempe. »

La barbulino. — *Spektakleja reklamkriisto*: Eniru, sinjorinoj kaj sinjoroj, vi vidos en la budo fenomenan personon: unu barbohavan virinon. Eniru, eniru; nur unu spesdekon kostas la enirbileto.

La klarigisto (en la budo): Jen la barbulino, estimata publiko. (Oni prezentas senbarban, ordinaran virinon.) Vi scias, ke nuntempe modo estas forrazi la barbon; senkulpigu do ŝin: ŝi ankaŭ, kiel precipe la virinoj, sekvas la modon.

Komercista logiko. — *Kontoristo*: Kiom da sumo mi skribu en la fakturon por la aĉetitaj komercaĵoj de S-ro Brasixupo? ĉu 50 spesmilojn? — *Patrono*: Ne. S-ro Brasixupo estas fidela kliento, li aĉetas multe, li ne marĉandas, li ĉiam estas kontenta, li neniam protestas; skribu do 60 spesmilojn.

Vortludo. — Du malsprituloj interbabilas. — *1-a malspr.*: Estas mirinde, kiel ege progresas la moderna tehniko! jam ekzistas aŭtomobilaj boatoj. — *2-a m.*: Vere; baldaŭ oni elpensos eĉ akvan vagonaron. — *1-a m.*: Tion mi ne kredas. Sur kia relo do rulus tiu akva vagonaro? — *2-a m.*: Nu, memkompreneble, sur *akvarelo*.

NIAJ KONKURSOJ

Kutime ni donas ĉe ĉiu konkurso du premiojn al la partoprenantoj de niaj konkursoj, t. e. 1) el libroj eldonitaj de Presa Esperantista Societo, en valoro de 2 S., — 2) samon en valoro de 1 S., — laŭ elekto de la premiotoj.

Pri nia julia konkurso ni ricevis respondojn de la sekvantaj partoprenantoj: Aglido 90, Th. Arndt 123, J. Barret 73, G. Bauer 59, S. M. Bauer 89, Blondulino 111, Maurice Brezin 45, Brunulino 37, R. M. Dolly 125, Karl Dudinsky 51, Ch. Durand 228, M. Eisler 102, Ph. Ellbogen 40, Alb. Fahrner 130, F-ino Th. Fentey 70, Fuŝproblemisto 88, F-ino Rose Garnier 69, Paul Garre 333, Kasparo Gellert 30, Edm. Gette 10, V. N. Gibeaux 247, F-ino Elisabeto Glück 80, Go-fodo 40, Vinc. Gogolak 210, L. Goldstein 89, J. González 60, F-ino L. Hall 67, Hazardulo 51, R. Hedborg 30, Leon Horowitz 479, Georgo Jani 109, Voldemaro Jerebcov 325, Karolino 150, Joh. Kautz 48, S-ino Killer-Rosenzweig 62, Lukas Knoll 72, Joh. Kovács 120, Jos. Kramer 53, Hermann Kuttner 180, S-ino Laurent 300, A. Leitner 149, S-ino Lina Lemberger 74, F-ino Tilda Lenk 66, J. Luber 5, Joh. Mallovits 52, H. M. Mestre 340, S-ino M. Meylan-Mairet 70, G. Milley 286, Baltazaro Mind 107, L. Müller 88, Nedemandu 89, Stefano Nemes 70, F-ino Marie Noreau 15, Roger Odinet 141, Rudolf Oesterreicher 8, Ed. Pahler 109, I. Palkoviĉ 41, F-ino Rose Petitjean 96, Jakobo Pirkner 68, Emile Prisier 111, Marcel Prisier 222, Ivan Probojĉeviĉ 30, F-ino V. Proksch 47, Pupinjo 162, Herm. Quittner 27, L. Rauschenberger 21, Ch. Renard 64, Restemulo 120, E. Richter 282, W. Ringbauer 50, G. Rujiĉiĉ 325, Rululo 75, L. F. S. 13, Karl Sauter 89, Senhara Studento 97, Serĉulo 35, A. Teodoroviĉ 177, Francisko de Tomka 101, Josefo Tóth 40, Vanta Pavineto 57, Filipino Weinberger 94.

Korespondado de la Redakcio.

A. K. (W.) — Dankon por la bela rusa revuo! La deziritajn ekzemplerojn ni tuj ekspedis.